Laudnoma problemo

5530

Deutsche Esperanto-Bibliothek
Aalen

8. MAI 1922

Parigo, la 25an de Aprilo 1922

Kara Kolego,

La plenan liston de la oficialaj radikoj mi sendas al vi. Tre ĝoje mi estus, se vi bonvolus montri al mi la blajn preferaojn (ŝteleto forgesita aŭ troa k.t.p.). Kompreneble ne temas pri Parigo aŭ forprenado jam regule oficialigitaj vortoj. Estas tre eble, ke unu aŭ alia radiko ne plaĉas persone al vi, sed mi ne povas. Penelopan laboron, detruante hodiaŭ la hieraŭan teksaĵon, sub pretekstо, ke unu fadeno, celere ne la sama por ĉiuj, ŝajnas malagrabla aŭ ne taŭgas!

Samtempe mi sendas la Raporton pri landnomoj de Prof. Grosjean-Maupin kun la voĉdono de la Akademianoj. Mi esperas, ke vi aprobos la sintenadon de via Akademio, kiu nur celas la plej grandan eblan unuecon en la uzado de nia komuna lingvo. Ni neniam forgesu, ke la plej grava argumento kontraŭ internacia lingvo estas, ke la unuecon nu ne sukcesos konservi. Ni do provu ta malon per necesa disciplino, silentigante niajn personajn gustojn aŭ preferojn.

Kelkaj Esperantistoj opinias, ke sufiĉas, por konservi tiun lingvan unuecon, la fidelecon al la Fundamentaj Principoj. Sed ili ne atentas, ke tiuj principoj kiel montris S-ro Rolland de l'Isle, ellasas la konstruon de du aŭ tri ofte tre malsimilaj lingvoj. La fidelec al fundamentaj eĉ Fundamentaj principoj ne estas sufiĉa garantio de unueco. Ĝis fobas garantii nur la nepra fidelec al nia Zamenhofa Fundamento, kiel fundamento, sur kiu ni konstruos ĉiam pli plenan riĉan lingvon*.

Prave D-ro Corret skribas: "Ni havas lingvon, ni ne faras lingvon" Pli ĝuste, - kaj tion li tre bone scias, - se ĝin ne povas nek devas fari la lingvaj institucioj ĝin faras efektive la uzantoj, sed nur la necesa kontrolo de la Akademio. En la Akademia Deklaraĵo, Prof. Grosjean Maupin klare montris la specialajn kondiĉojn de internacia lingvo, kiuj necesigas tiun kontrolon, por eviti la disfalon en dialektojn. "La kontrolo de la Akademio, se forprenante la liberecon de ĉiu Esperantisto, nek barante la normalan naturan kaj laŭnature internacian evoluadon kaj pliriĉiĝadon de la lingvo, tamen konservas ĝian severan unuecon... La Akademio devas esti konstanta helpanto, informanto kaj konsilanto de ĉiuj Esperantistoj, sed ankaŭ rememorigante al ili la necesan disciplinon... ĉar, kiel skribis D-ro Zamenhof, la lingvo internacia, simile al ĉiu lingvo nacia, povos bone atingi sian celon nur en tiu okazo, se ĉiuj uzos ĝin plene egale" « Vivanta lingvo de vivanta popolo » diris el la kvente D-ro Privat. Via ĝi estu por ni ĉiuj! Ĝin ni do respektu, kiel ni respektas nian nacian lingvon!

* * *

Pri la reorganizo de la lingvaj institucioj, la Akademio unuanime opinis, ke ne estas necese, ŝanĝi la laŭ la konsiloj de D-ro Zamenhof starigitan Regularon, kiu en §6 donas al la nacia kaj specialaj Societoj ĉiun necesan povon por prezenti kandidatojn.

Ĝi deziras havi la rajton, kiun la praktiko montris tre necesa, nomi Akademiajn Korespondantojn por gravaj lingvoj ne sufiĉe aŭ ne reprezentitaj en la Akademio. Ĉiuj Korespondantoj, kompreneble, ne havos la rajton voĉdoni

---

* Ni ne parolu pri antaŭmilita kaj postmilita Esperanto, antaŭmilita kaj postmilita periodo. Por ni ĉiuj povas ekzisti nur unu Esperanto la Zamenhofa, nur unu periodo - ĝis kiam oficiale, la registaroj deprenos Esperanton, - la Zamenhofa, propagandat

sed oni povus interkonsiliĝi oficiale kun ili pri lingvaj demandoj. Ilia nombro ne superusla trionon de la Akademianoj (sekve maksimume 6) Ĉu vi konsentus, ke ilin la Akademio elektu, el escepto, ekster la L. K., kaj ke, per tiu elekto, ili fariĝu L. K-anoj? Mi rimarkigos, ke, ĉar tia escepto certe neniam superus du aŭ tri eminentajn esperantlingvanojn, tia konsento viaflanke tute ne povus esti danĝera, malpliigante la aŭtoritaton de la elektitaj L-K-anoj. — Sed vi decidos mem!

La Akademio alipatte opinias, ke pli bone estus se proporcie la diversaj lingvoj estus pli ĝuste reprezentataj, (ekzemple nun tro multaj Francoj, tro malmultaj Germanoj). Gravaj lingvoj, kiel la greka, mankas; Japanujo devus havi reprezentanton. Sed la aplikiĝo de tiuj ĉi principoj estos ebla nur, kiam ni precize scios, kiuj estas ankoraŭ L. K-anoj: kelkaj mortis, multaj malaperis aŭ neniam respondas. Ni devas do antaŭ ĉio starigi liston de la efektivaj L. K-anoj. Konsekvence tiujn, kiuj ne respondos tiun ĉi cirkuleron kaj ne respondis la lastajn, la Akademio rigardos kiel proprajbole eksiĝintoj. Por restarigi la L. K. ne estas eble agi alimaniere. Ĉiuj certe tion kompreneos. Nur post respondo, ni povos zorgi pri elekto de novaj L. K-anoj, de Akademianoj kaj pri la starigo de sekcioj ĉu en la Akademio ĉu en la Lingva Komitato.

Post ekrigo de D-ro Comet kiel direktoro por la Scienca kaj teknika Vortaro, la Akademio unuvoĉe komisiis al S-ro Rollet de l'Isle la tasko organizi kaj direkti tiun ĉi fakon. Tion li faros en plena libereco kaj la kontrolo de la Akademio konsistas nur en tio, ke, kiam post serioza spertado, li estos starigintа liston de teknikaj vortoj, la Akademio ilin plene aŭ parte oficialigos. Al la scienculoj por starigo de teknika (mi ne diras: komunlingva) terminaro ni devas lasi plej grandan libereon. Sur tiu ĉi kampo ili solaj estas kompetentaj. Ne dubo tamen, ke iom post iom nia komuna lingvo, kiel ĉiuj naciaj lingvoj, grande kaj praktike profitos de tiu ĉi sendependaj scienciaj laboroj; sed, mi ripetas, iom post iom, pretskaŭ senkonscie kaj ne per altrudo.

× × ×

Kaj nun permesu al via ne plu juna Prezidanto, al la blankbarba kunlaborinto de nia neforgesebla Hodler, ke, finante tiun ĉi cirkuleron, li turnu sin al vi kun paroloj de konkordo kaj de paco. Ni ĉiuj evitu zorge en niaj polemikoj, — cetere signoj de arda konvinko kaj vivo —, akre ataki kaj persvade tiujn, kiuj ne ĉiam same opinias, kiel ni! Ili ja estas Esperantistoj, kaj tiel sincere kiel ni deziras nur la venkon de lingvo, kiu nin ĉiujn superas. Kontraŭ la ĝenerala indifferenteco kaj ofta malamikeco ni restu unuiĝintaj.

Tia estas la deziro de via Prezidanto kaj de ĉiuj liaj Akademiaj Kolegoj.

Manon en mano, antaŭen!

Via tre sincera
Th. Cart.
Prezidanto de la L.K. kaj de ĝia Akademio.

× × ×

P.S. Bonvolu resendi la tie ĉi entenitan poŝtkarton kun viaj respondoj kiel eble plej baldaŭ, kaj ĉiuokaze (por la Eŭropaj landoj) antaŭ la 30a de majo.

× × ×

Raporto de Prof. Grosjean-Maupin

Kara sinjoro Prezidanto,

Vi petis de mi tute objektivan kaj pure sciencan raporton pri la landnomoj. Jen ĝi estas:

1. Pri la landnomoj kaj popolnomoj.

"Akceptinte la malfacilan taskon, kiun komisiis al mi la Prezidanto de la L.K. kaj proponinte ne nur la dankindajn raportojn, kiujn mi ricevis el multaj L.K-anoj kaj el kelkaj aliaj esperantistoj, sed ankaŭ antaŭajn artikolojn aŭ verketojn, mi provos apliki objektivan senpartian metodon al la demando pri land- kaj popolnomoj.

Por gvidi nian esploradon ni antaŭ ĉio bezonas, observinte la faktojn, serĉi la ĉefajn kondiĉojn, kiujn devas plenumi taŭga solvo de la demando. Ĉiamaniere ni starigos generalajn kaj nerigidajn principojn aŭ, pli ĝuste, ni montros gvidajn dezirindaĵojn, pri kiuj espereble ĉiuj akceptos konsenti. Mi do devas rimarki, ke:

1º) La landnomaj kaj popolnomaj radikoj estas efektiva "kvazaŭ propraj nomoj, leznotaj, kiel la familiaj nomoj" (Christaller), kaj ili staras "ekster la Fundamento" (Christaller, Aymonier, Byguem, Matton, Scott). *

2º) El tio sekvas, ke same, kiel oni ne rajtas trudi al iu formon aŭ prononcadon de lia propra nomo, kiu ne plaĉas al ni, "neniu instituto rajtas trudi nomon al landanoj, kiuj preferas alian nomon" (Christaller). Oni do estis tre prava, forigante la nomon Svisio, kiu ĝenerale malplaĉis al la Svisoj, kaj anstataŭigante ĝin per alia formo; oni certe povus akcepti la formojn Itali-o, Rusi-o, Germani-o, Aŭstri-o, por ilia sufiĉa internacieco, se ili plaĉas al la respektivaj regnanoj, sed la vorto Franci-o ne estas akceptinda, ne nur ĉar ĝi ne estas sufiĉe internacia, sed precipe ĉar ĝi malplaĉas al tre multaj Francoj. Samo estas pri multaj vortoj, kiujn oni rajtas formi tute regule, kvankam maltaŭge, per la helpa radiko Land. "Estas pli bone uzi ankoraŭ Italujo, ol aprobi la ĝeneralan uzon de Itallando, ĉar Land estas teŭtona finiĝo tre riproĉinda pro sia longeco, malbeleco, malinternacieco" (Meazzini).

3º) "Ideo de lando estas nature tre malsimpla ideo, formita el multaj diversaj, materiaj kaj moralaj elementoj; ĉiu landnoma radiko sugestas al nia spirito ne nur la ideon pri la geografia teritorio mem, pri la montoj, riveroj, diversaj regionoj, urboj, pri la produktoj, riĉaĵoj, monumentoj, kurioz aĵoj, k.t.p., sed ankaŭ samtempe pri la naciano, la enloĝantoj, la naciaj karakteroj, la nacia lingvo, la institucioj, fine pri la eminentaj homoj, la glorajoj kaj la tuta historio de la nacio" (Byguem).

4º) Tian kompleksan ideo elvokas la landnomaj kaj popolnomaj radikoj per si mem, eĉ ne aldonante ian landan aŭ anan sufikson. Sekve "la plej grava kaj malfacila afero estas ne la elekto de ia sufikso, sed la elekto de la radiko" (Byguem). "Por elekti la taŭgan radikon oni komprenebla uzos la metodon uzitan por trovi la radikojn de la komuna lingvo, t.e. oni kolektos la nomojn uzitajn en la ĉefaj naciaj lingvoj, kaj oni elektos la plej internacian radikon, donante la plej grandan influon al la nacia formo, kondiĉe ke ĝi estu skribita en la latina alfabeto" (Rollet de l'Isle).

5º) La historia scienco kaj la etnografio instruas al ni, ke, pro la multegaj migradoj de gentoj kaj pro la miĝara intermikesiĝo de malsamrasaj individuoj, la rasoj en la nuna tempo kaj jam de longe aperaŭ ekzistas kaj la ideo de raso ne plu havas precizan rilaton kun la ideo de nacio. Raso estas io nedistingebla kaj nedifinebla. Tiu, kiu nune parolas pri angla, belga, dana, franca, hispana raso aŭ gento, parolas pri "mito"; la plejmulto el tiuj, kiujn oni kutimas nomi Germanoj, ne estas germanrasanoj, sed germanlingvanoj. Kontraŭe, oni povas ĉiam facile distingi kaj precize difini, eĉ se ĝiaj limoj ŝanĝiĝas, la regnon, la politikan kaj geografian teritorion.

6º) Estas precipe grave kaj tre dezirinde, por la facileco de la lingvo,

---

* Ne samopinias tamen, kiel Sro Christaller k.c., multaj Esperantistoj, kiuj sin apuzas sur: Ekzercaro § 40 (in fine) kaj Universala Vortaro (uv).

ke la solviga respondo, ĝenante kiel eble malpli la ĝeneralan kutimon de la naciaj lingvoj; kaj ĉi frazentu unusolan kaj ne esceptan fundamentan aŭ almenaŭ pli simplan procedon. "Regulecon estas nepre dezirinda (k.t.p.), estus dezirinde ĉefe pro la neŭtraj popoloj, ke oni povu atingi regulecon; ... la pli bona solvo estus certe tiu, kiu vere konduĝus la ĝeneralan ĝis kiran bezonon al unueco, regulecon kaj internacieco" (Privat). Celas "reguligante kaj unuformigante, la lingvo Esperanto obeos la saman naturan leĝon de evoluado", kiun la pli aŭtoritataj nunaj lingvistoj kaj aparte la mondfama Profesoro Meillet, konstatas ĉe la naciaj lingvoj, kiuj konstante emas kaj pli proksimiĝas al pli simpliĝo kaj uniformiĝo.

Utiligante la sufiksojn gvidajn rimarkojn, ni nun ekzamenu la diversajn eblajn solvojn de la demando. Ekzistas nur ses eblaj procedoj:

1º) uzi sufikson ĵen por devenigi la landronomon el la popolnomo, ĵen inverse;

2º) uzi sufikson nur por la landronomo;

3º) uzi sufikson nur por la popolnomo;

4º) uzi paralele du sufiksojn devenigante per ili la landnomon kaj la popolnomon el neŭtrala radiko;

5º) uzi neniun sufikson, uzante du malsamajn radikojn;

6º) uzi neniun sufikson, uzante nur saman radikon.

I.) La unuan duoblan procedon sekvis Zamenhof. Oni povas riproĉi al ĝi, ke ĝi estas malsimpla kaj ke ĝi en multaj okazoj tute kontraŭas al la historia kaj fakta realeco aŭ al la nacilingvaj kutimoj. S-ro Hodler rimarkigas, ke estas malfacile derivigi Italujo el Italo, Egiptujo el Egipto, Portugalujo el Portugalo, Japanujo el Japano, ĉar "en ĉiuj lingvoj oni uzas la inversan procedon".

La sistemo proponita de S-ro Hodler ne estas malakceptinda pro tio, ke ĝi anstataŭigas iun sufikson per alia, sed pro tio, ke ĝia proponanto preferis "konservi la nunan duoblan procedon", kvankam li sincere konfesas, ke tia duobla procedo pregentas gravan malfortmaĵon, ĉar neniam "oni povas scii, kiam oni devas derivigi la landon el la gento aŭ inverse". Dirante, ke, ne celante la "sanĝon de la nuna procedo, li tamen celas ĝian "reguligon", S-ro Hodler kredigas, ke lia propra sistemo povas efektivigi la dezirindan regulecon; bedaŭrinde oni devas konstati, ke li efektive ne sukcesis montri certan regulon pri diferencigo de la derivmaniero kaj ke li kontentiĝas proponante nur la absolutan forigon de la kaŭrola, tute korekta kaj tute ne ĝenanta kvazaŭ sufikso Land kaj la anstataŭigon de la Fundamenta sufikso Uj per alia nova sufikso, kio tute ne solvas la solvindan punkton, nome la duoblecon. Krom la duobleco de formado S-ro Hodler devas ankaŭ konfesi la necesecon de esceptoj, kiel Nederlando, Finlando, Anamo, Arĝentino, Tonkino, Brazilo, Maroko, k.t.p.

Certe estas, ke per uzado de la landnoma sufikso -I, oni kelkfoje ricevas vortojn, kiuj havas la saman fizionomion, kiel la nacilingvaj landnomoj; sed oni povas pli simple atingi la saman profiton, elektante sensufiksajn radikojn finiĝantajn per I. "Letere la finiĝo -o estas konsternanta, kontraŭkutima, nek nacia, nek ĝenerale internacia en vortoj kiel Francio, Egiptio, Portugalio, Ĉinio, k.t.p." "Kiel ajn mi rompas al mi la kapon, mi tute ne komprenas la utilon anstataŭi la Fundamentan sufikson Uj ĉe landnomoj .... Ĉu iu povas serioze pretendi, ke eksistas ĉe la pli malgranda danĝero de miksiĝo inter Rusujo kaj Supujo? ... Fonetike -IO pli oftigas la akcentatajn Isonojn, da kiuj nia lingvo jam nun havas sufiĉegon. Kompreneble ĉe vere praktika besono oni ne atentu la fonetikon, estetikon aŭ belsonecon, sed sen neceso oni ne ŝanĝu la lingvon ..... Pli ol oni ne malofte dubas, ĉu IO estas efektive sufikso aŭ natura finiĝo de landnomo." (H.M. Scott).

Dezirante kompletigi la neplenan Hodler'an liston kaj precipe malaperigi la esceptojn, S-ro Meazzoni, en sia ĵus aperinta, cetere tute rekomendinda Esperanto-Itala vortaro, proponas ankaŭ multajn aliajn strangajn, malinternaciajn, senutile longegajn formojn, kiel Flandrio,

Engadinio, Montenegrio, Groenlandio, Holandio, Tirolio, Tonkinio, Javo, Hindio, Palestinio, Rubio, Kanadio, Levantio, Madagaskario, Siamio, Transvaalio, Marokio, Sudanio, Tibetio, Turkestanio, k.t.p.

La proponoj pri aliaj sufiksoj anstataŭ UJ', kiel J' (Christaller, Leono Zamenhof, Malton, Maggolini), EJ' (Guet), IJ' (Delanoue), prezentas prokesmume la samajn multe fortunajojn, kiel la sufiksо I'. La sufiksо J' ebligus eviti la malagrablan akcentitan I, sed ĝi igus multajn radikojn strangformaj kaj malfacile rekonebla, escepte eble por Slavoj, ĉe kiuj ne fronnceblaj, kiel Anglujo, Aŭstrijo. La sufiksо IJ' prezentus kompreneble la kunajn malbonajojn de I' kaj de J', sen ia ajn profito.

II) Esceptante la riproĉon pri malsimpleco, oni povas fari al la dua procedo la samajn riproĉojn, kiel al la unua. Sro Hodler tute prave diras: "Estus tute arbitra formi ĉiujn landnomojn per la sufiksо UJ. Fortoj kiel Holandujo, Kanadujo, Argentinujo, rekas kontraŭ la principo de internacieco, ĉar en ĉiuj idiomoj la radiko de ili rilatas ne al la loĝanto, sed al la lando mem". Sed li ne atentas, ke tion, kion li malfavore diras pri la sufiksо UJ', oni tute egale devas diri pri ĉiu ajn alia sufiksо, ĉu J', ĉu IJ', ĉu EJ', ĉu eĉ I'. Formoj kiel Holandio, Irlandio, Islandio, Finlandio, Marokio, Rubio, Kongio, k.t.p., tute ne estas pli internaciaj nek pli akceptebla ol la egalvaloraj formoj kun UJ'.

III) La tria procedo estas "simpla" (Hodler), konforma al la elektiva etnografia realeco kaj al la instruoj de la historia scienco, kaj tre "alloga" (Hodler). Jam antaŭ kelkaj jaroj Sro Rektoro Boirac starigis, kiel principon, ke "ĝi estas la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero kaj ke la alia maniero, nomante primitive la nacion kaj devenigante la komon de la lando por sufiksо, estas dua, akcesora, sekve, en okazo de dubo, neniam proferinda, ĉar la terloko nomas siajn loĝantojn". Zamenhof mem konsideris tiun ĉi sistemon, kiel la plej bonan, kaj proponis, ke, "elektante por la landoj neŭtralajn, geografiajn nomojn, oni senescepte uzu la derivadon per la sufiksо AN'. Ankaŭ Sro Privat, Aumonier, opinias tiun solvon la plej bona, se ĝi estas ĉiuokaze elektivigebla.

Sed ĉu ĝi ankaŭ prezentas malfacilaĵojn? ĉu Germaniano, Turkiano, Hispaniano, estas akceptebla vortoj? ĉu, akceptante formojn kiel Danano, Polano, Hispanano, Grekano, Britano, k.t.p., oni ne estos devigata preni duan malsaman radikon por signifi la landon, ĉar ĉi ne malfacile asigni la landan signifon al la vortoj Dano, Polo, Hispano, Greko, Turko, Brito.

Sed oni devas konfesi, ke formoj kiel Svedo, Svedano — Norvego, Norvegano — Portugalo, Portugalano — Japano, Japanano — Franco, Franciano — Egipto, Egiptano — Italio, Italiano — Hungario, Hungariano — Belgio, Belgiano, Holando, Holandano, k.t.p., estus tute taŭgaj, el ĉiuj vidpunktoj.

IV) La kvara procedo, kiu uzas paralele du aŭ eĉ pliajn sufiksojn aŭ vortojn (UJ', I', AN', UL', LAND'), estas rekomendata de Sro Mollet de l'Isle; ĝi bedaŭrinde necesigas iom multajn apartajn regulojn, t.s. esceptojn, kaj aliflanke ĝia konstanta severa precizeco estus en la komuna uzado ofte ĝena kaj malutila. Sro Norman Frost ankaŭ petas, ke oni diferencigu la sencon de UJ' (etnografia) kaj la sencon de I' (politika), sed tiaj delikataj diferencigoj koncernas pli la teknikan ol la komunan uzadon.

V) La kvina ebla procedo estis proponita de neniu, ĉar ĝi prezentas senutilan komplikon kaj la elekto de ambaŭ diversaj parencaj radikoj estus malfacila pro la malsameco inter la nacia lingvoj. Tamen tia dueco de radiko estus eble oportuna por kelkaj nomoj.

VI) La sesan procedon proponas Sro Esquiem kaj certe estas, ke ĝi estas la plej simpla el ĉiuj kaj prezentas multajn oportunaĵojn, kaj igas pli facila la elekton de la radiko. Ĝi estas tute konforma al la germanlingva kutimo, kiuj plej ofte diferencigas la landnomon je la popol-

nomo nur per malsama finiĝo: Schweiz, Schweizer – Schweden, Schwede – Norwegen, Norweger – Polen, pole – Belgien, belgier – Spanien, Spanier – Böhmen, Böhme. Sro Eyquem proponas, ke oni diferenciĝu la landnomon kaj la popolnomo nur per respektiva substantiva aŭ adjektiva finiĝo. Tio estas iom simila al la franclingva uzado de adjektiva formo por signi la nacianon: Français, américain, anglais, espagnol, italien, kaj. Tiamaniere ni ekzemple ricevus: Franco (lando), Francaj (nacianoj) Norvego (lando), Norvega (nacianoj); Svisso, svisa; Persio, persa, k.t.p.

Oni povus ankaŭ pli simple uzi la substantivan finiĝon egale por la landnomo kaj por la popolnomo, diferencigante la senson nur per la uzado aŭ neuzado de la artikolo kaj de la pluralo. Tiamaniere nur per la sekso la franclingvanoj distingas la ete La kaj Le Perse, La kaj Le Suisse, La kaj Le Corse.

Tamen oni devas konfesi, ke tiuj ĉi ambaŭ proceduj ne triĝas egale bone por ĉiuj radikoj Anglo, Brito, Greko, Turko, Hispano, Polo, Dano ktp, kiel ni jam diris, malmulte konvenaj por signifi landon, kaj estas malfacile trovi alian radikon, kiu egale bone taŭgus por landnomo kaj por popolnomo.

*

* *

Mi konfesas, ke, komencante tuŭĉi esploron sen ia antaŭjuĝo, mi sincere esperis, ke mi povos proponi precizan solvon de la problemo. Sed, esplorinte metode kaj detale la demandon, kolektinte kaj komparinte la landnomajn radikojn en la ĉefaj eŭropaj lingvoj, kunmetinte proksimume plenan liston da akceptindaj esperantaj landnomaj radikoj elektitaj laŭ la principo de internacieco, kiel ĝuste klarigita de Sro Rollet de l'Isle, prove aplikinte ĉiun el la ses ebleaj solvoj al ĉiu tia radiko aparte, mi estas devigata konkludi, ke nenia solvo estas plene kontentiga nek absolute kaj nulis kutebla preferinda super la aliaj.

Sro Privat estis prava, antaŭvidante, ke "plena unueco ne estas facile atingebla, ĉar tio devigus ŝanĝon de multaj radikoj," kaj oni povas diri pri la landnomoj tion, kion Sro Rollet de l'Isle, en sia majstra Konsilaro, diris pri la scienca kaj teknika lingvo: "Ni ne povas, kiel estus deziranda, kaj kiel Esperanto ebligas fari, verki tute perfektan, laŭlogikan kaj laŭregulan lingvon, ĉar tia lingvo ne estus sufiĉe internacia; kaj ni ne povas eniriĝi en Esperanton, kiel ĝiaj principoj ebligus tamen fari, ĉiujn internaciajn terminojn, ĉar, tiel farante, ni neniigus la grandan plisimpliĝon, kiun donas al la lingvo la metodoj de formado de la kunmetataj vortoj."

Nur la ĝenerala praktika uzado povos definitive decidi pri la afero, unue elektante inter la diversaj sistemoj tiujn, kiuj prezentas plu da bonaĵoj kaj malpli da malbonaĵoj kaj esceptoj ol la aliaj, kiuj estos kredeble iom post iom forĵetataj.

La Lingvaj Institucioj sia flank ke devos plenumi gravan rolon, zorgante, ke oni ne malatentu la konsilojn de Zamenhof, ke oni respektu la spiriton de la lingvo kaj precipe, ke oni conservu ĝian elastecon*. Kial oni tro facile parolas pri danĝera kaoso en multaj okazoj, kiam temas nur pri libereco kaj facileco, kiu, dum ĝi ne malhelpas la kompreneblecon kaj la klarecon, estas tute sendanĝera kaj neĝenanta. Ni ne forgesu, ke Zamenhof konstante malrekomendis troan severecon kaj rigidecon, kiuj ne estas konformaj al la spirito de la lingvo, nek al la ĝoj de la homa intelekto, nek al la bezonoj de la vivanta praktiko."

Mi esperas, sinjoro Prezidanto, ke vi opinios, same kiel mi, ke estas taŭge komuniki mian raporton kun preciza demandaro al niaj Akademiaj kolegoj.

Via tre sindone

E. Grosjean-Maupin,

Direktoro de la Akademia Sekcio por la Komuna Vortaro.

* kaj flekseblecon. Fakto estas, ke multaj esperantistoj malpravas emas tuŝeri rigidecon kaj suveran logikecon el klasikaj

Dum la voĉdonado de la Akademianoj D-ro Privat petis de la Prezidanto, ke li aldonu al la demandaro la sekvantajn demandojn, ilin sendis al ĉiuj Akademianoj, petante ilian voĉdonon.

1) "Ĉu vi konsilas oficialigi jenan rekomendon de Roberto Boirac:"

"Ne provis solvi la malfacilan demandon pri la plej bona maniero formi la nomojn de popoloj kaj landoj; tamen ni starigis kiel principon, ke la ĉefa kaj plej ĝenerala maniero estas nomi primitive la landon kaj derivigi la nomon de ĝia loĝantoj per la sufikso -an, kiel ekz. Eŭropo Eŭropano, Irlando Irlandano, Parizo, Parizano k.t.p. kaj ke la alia maniero, t.e. nomante primitive la gento aŭ nacion kaj deriventante la nomon de la lando per la sufikso -uj-, kiel ekz. Franco Francujo, Germano, Germanujo, estas dua akcesora, servante en okazo de dubo neniam preferinda. Nur kiam ekzistas efektive gentoj, nacioj, havantaj propran historion, nur tiam oni povas diri, ke la popolo nomas sin. landon kaj uzi la duan proceduron; sed en ĉiuj ceteraj okazoj estas pli ĝuste diri, ke la terloko nomas siajn loĝantojn; kaj pro tio ŝajnas al mi, ke ekster Eŭropo kaj kelkaj partoj de Azio kaj Afriko, ĉie aliloke, nome en Ameriko oni devas formi la nomojn per la unua proceduro. Brazilo, Ĉilo, Peruo, Mekziko, Kanado k.t.p. ne estas laŭ nia opinio loĝantoj de Brazilujo, Ĉilujo, Perujujo, Mekzikujo, Kanadujo, sed kontraŭe landoj, kies loĝantoj estas Brazilanoj, Ĉilanoj, Peruanoj, Mekzikanoj, Kanadanoj k.t.p. Mi do tre dezirus, ke ĉiuj Esperantistoj konsentu pri tiu regulo: En okazo de dubo oni ĉiam preferu la sufikson -an al la sufikso -uj- por formi la nomojn de popoloj kaj de landoj."

[Certe ne tre klare estas redaktita la lasta frazo. Ne konflikto ekzistas inter -uj kaj -an. An' oni uzas nur por la regnanoj de landoj, kies landnomo ne devenas de la loĝantoj. La alia parto de la paragrafo estas konforma je la Zamenhofa sistemo kaj ne bezonas specialan oficialigon! Ni ne tre oficialigu! Th. C.]

2) "Ĉu vi konsilas akcepti jenan proponon de D-ro Privat: A. "La f. K. konstatas, ke ekzistas en la Fundamenta Esperanto tre diversformaj landnomoj laŭ modeloj Rusujo, Finnlando, Bolivio, Kanado k.t.p. sed ke plena unueco ne estas facile atingebla, ĉar tio devigus ŝanĝonde multajn radikojn. Tamen pli da ordo kaj regulecon estas dezirindaj. Pro tial la L. K. rekomendas ĝeneraligon de la principo Boirac: Transskribante landomojn en Esperanto oni ĉiam preferu internacian kaj klaran nomon de la terloko sen ia ajn speciala sufikso, nur zorgante, ke oni ne povu konfuzi tiun nomon kun tiu de gento C. Ekz. Franco ne povas samtempe nomi landon kaj popolanon. La nomojn de loĝantoj oni formas per sufikso -ano. Kiam ekzistas aparta gento aŭ nacio, tiam speciala radiko nomas la homon. Same kiel oni havas filozofo apud filozofio, astronomo apud astronomio, tiel same oni havas Slovako apud Slovakio, Skoto apud Skotlando.

B. Oni povas, se oni deziras, distingi inter Ruso kaj Ruslandano aŭ Turko kaj Turkiano la popolano kaj la simpla regkano eble aligenta. Aŭ kaŭ oni povas distingi inter Turkio, la regno, kaj Turkujo, la etnografia regiono, kie loĝas Turkoj." (Vidu Demandaron No-j 4 kaj 5)

× × ×

La gravan laboron de Prof. Grosjean-Maupin sendis per rondiranta kajero la Prezidanto de la L. K. al ĉiuj Akademianoj, escepte al S-ro Ostifejeff, kiun li ĝis nun ne povis atingi. × Ĝi rikoltis ĝeneralan aprobon kaj indan laŭdon pro la granda laboremo, la scienco kaj la konscienco de la verkinto.

Inter la rimarkoj, kiujn ĝia legado okazigis mi citos tie ĉi nur la plej gravajn: 1. Iu Akademiano rimarkas, "ke malplaĉas al kelkaj por landnomoj: Rusujo = ujo de Rusoj! Ili do forgetas tiun formon

---

× La leteroj por Rusujo ĝis lastatempe revenis senresponde aŭ... perdiĝis. Ni esperu, ke post la Konferenco en Genua la rilatoj kun Rusujo fariĝos pli facilaj kaj pli regulaj.

Sed morgaŭ, logike, ili devos forĝeti: patrujo = ujo de patroj!! Kaj, pro tiuj vortoj?... ĝi liĝas danĝereca vojo!

D-ro Corret akridas... Ni havas Esperanton, ne ni faras lingvon... Ne bonvoli konsideri la Fundamento. Ĝi estas leĝa por ni. Nur tion povas konstati la Akademio. Sekci sekvojn ĝi zajtas nur pri punktoj ne sortitaj de la Fundamento... En Esperanto la sufikso por landnomoj estas uj! Intima kaj teorie pekado eksplicita kontraŭ tiu ĉi regulo, sed nur parta kaj ne ĝenerala. Ĝi aliam "sufikson" ol uj por landnomoj estas do peko kaj "Gerard" fentraŭ Esperanto... sed... la Akademio ne povas ordoni, devigi aŭ malpermesi. Ĝi povas nur konsili... Kion ĝi devas toleri.

Same Prof. Grosjean-Maupin en siaj respondoj al la Demandaro «... Toleremo nenion signifas flanke de la Akademio, ĉar toleri tion, kion oni ne povas malebligi, ne estas tolerado.»

D-ro Privat: La rimarko 5a pravigas la vidpunkton de D-ro Zamenhof. Ĉar la gentoj kaj rasoj farigas pli kaj pli mixtaj, la nomo de la lando devas esti la ĉefa, kaj sendependa. Tial oni Esperanto nenion rompi kaj konservi la historion, antaŭvidante samtempe la estontecon. Estas do tre bone, ke lando nomiĝu Ĉeĥoslovakio, ĉar oni povas tiel paroli pri Ĉeĥoj, pri Slovakoj, eĉ pri Ĉeĥoslovakoj kaj akkaŭ pri Ĉeĥoslovakiano, se tion absolute deziras la germanaj Lozanto de Moravio aŭ la Rutenoj subkarpataj. La metodo Zamenhofa ĉiam estis konservi la akiritaĵojn kaj nur aldoni bezonaĵojn flanke. Sen post iom la vivo pasas de unu al la alia!

S-ro Preskaŭ same S-ro Kühnl

S-ro Wackrill tute prave diras: Se "regulego" signifas, ke ĉiuj land- kaj popolnomoj devas esti formitaj laŭ unu sola modelo, t.e. pri unu konstante sufikso (uj, io ejo, lando, ano), tiam "regulego" estas nur Kiniero Regulo tia estas ne aplikebla kaj nepre naskos senfinajn escepitojn, aŭ absurdaĵojn.

[Oni do ne riproĉu D-ron Zamenhof, ĉar li ne ĉiam uzis la de li mem donitan sufikson-uj, sed por Amerikaj landoj ekzemple uzas alian formon: Kanado, Peruo, Th.C.]

Kaj aliaj kolegoj pardonu, se mi ne citas tie ĉi iliajn kvankam ofte tre interesajn rimarkojn, sed ion novan ili ne alportas kaj pro multaj motivoj mi ne povas tro plilongigi tiun ĉi resumon de diversaj opinioj. Fin mi finos per tre trafaj vortoj de Prof. Grosjean-Maupin, kiuj klarigas kaj kompreniĝas la intencadon de la Akademio en la landnoma demando.

Konkludo:

"La raporto sufiĉe pruvas, ke nenia sistemo estas plene rekomendinda el "
"la teoria vidpunkto.... Pro tiu ĉi motivo, oni devas konsideri nur la praktikan "
"vidpunkton... El tiu ĉi vidpunkto la fideleco al la ĝis nun ĝenerale akceptita "
"tradicio estas pli sendanĝera ol ia ajn provo..." Th. C.

Demandaro kaj Respondoj.

1) Ĉu silenti kaj ne plu pertraktu la demandon pri la landnomoj?
10 ne — 2 dubaj = Ne

2) Ĉu konsilinda la plena liberecco?
11 ne — 1 duba = Ne

3) Ĉu konsilinda unu el la montritaj sistemoj?
10 ne — 2 jes (1. ej — 1. Boirac) = Ne

4) Ĉu oficialigi la rekomendon de Rektoro Boirac?
8 ne — 3 jes — 1 duba — = Ne

5) Ĉu akcepti la proponon Privat?
9 ne — 3 jes = Ne

6) Ĉu konsilinda la simpla fideleco al la Fundamenta kaj tradicia-uj?*
1 jes 2 ne 1 duba = jes

---

* Tio, kompreneble laŭ la Zamenhofa sistemo kiu ne koncernas la landojn, kies nomo finiĝas per lando aŭ kiuj estas ekster Eŭropo kaj Azio; Irlando, Kanado Peruo, Maroko K.t.p.